

# EKO 2021

## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, de post 2013  
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj  
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-14 sendita el Budapeŝto la 10an de aprilo

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 72 ĵus venis al fino – valora kontribuo



Ene de la lastaj horoj finiĝis la 72a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). Tio okazis kadre de la 8a Nacia Irana Kongreso. Per tio la AMO-programo por 2021 estas lanĉita. En posta EKO-komuniko ni raportos pli detale pri la seminario. La rezultoj baldaŭ aperos en la retejo <aktivulo.net>. Jen praktika avantaĝo de nur 4 aŭ 5 seminarioj jare. Kun ege limigitaj rimedoj, tio ebligas pli bonan preparadon kaj postsekvon de la prezentaĵoj. Sen giganta kreskigo de rimedoj, neniam la programo revenos al la ritmo de dek aŭ dekdu seminarioj jare.

La enkonduko de la seminario venis de Stefan MacGill laŭ la temo 'Stopi la Digojn'. Ĝia pli frua versio disiris kun EKO 11. La sekvaj du prelegoj efektive prezentis la laborojn kaj planojn de du el niaj plej aktivaj fakaj asocioj – la instruistoj kaj la fervojistoj, liveritaj de Ivan Colling, kun aktiva partopreno de estrarano 'Unika' kaj por IFEF prezentis Rodica Todor, kun partopreno de Vito Tornillo. Entute partoprenis pli ol 40 personoj, kun 15 pliaj sekvantoj en la Jutuba kanalo de 'UEA viva'. Fermis la prezentaĵojn Renato Corsetti, kiu defiis nin pensi pri la esenco de esperantismo kaj la graveco informegadi pri la lingvo. Leviĝis konkretaj problemoj kaj diversaj pledoj tra la 40-minuta fina forumo. Entute, valora sesio kaj seminario.

Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj



Redaktoroj:  
Stefan MacGill kaj  
Mirejo Grosjean



**ENHAVO**

- AMO 72
- Poznano vokas
- Tradukistoj!
- Kantfestivalo
- Ertl spektebla
- ALTE strebu!

Sekvos informoj pri la AMO-programo tra la cetero de la jaro. En aktiva preparo estas seminario en Greziljono, kun daŭra kaj ripeta instigo al TEJO kaj ILEI gastigi seminarion. Penseblas eĉ, ke la elane aktivigata faka asocio pri komerco (IKEF) gastigu seminarion. Aliaj proponoj bonvenas. Informoj sekvos.

SMG

## Eŭropo serĉas planlingvajn tradukistojn

La buĝeto por 2021 de la Eŭropa Fondaĵo por la plibonigo de la viv- kaj laborkondiĉoj (Dublino), publikigita en la Oficiala Bulteno de la Eŭropa Unio ([2021/C 114/02](#)) je 2021-04-01 enhavas aldonan laŭtempan postenon (rango AD7) kompare al 2020. Laŭ piednoto al la buĝeta tabelo (p. 10) tiu posteno rilatas al „kunordigo de planlingvaj traduktaskoj“. Kvankam la planlingvo ne estas nomata, de kiam en 2019 laborgrupo de la Fondaĵo starigis tiurilatan (ne-publikigitan) raporton, oni scias, ke temas pri Esperanto. La laborgrupo bazigis siajn rekomendojn sur la raporto de profesoro Grin kaj havas la apogon de la franca parlamento (raportis [Libera Folio](#)).

Sendis Klaus Leith



## La 9a Kantfestivalo en Vroclavo – partoprenu!

La prezentaĵo de la premiitoj okazos en la 12a de septembro (dimanĉe).

Ĉiu partoprenonto bonvolu alsendi videon kun registrita

kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – ĝis la 15a de aŭgusto: <https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu>.

Vidu pli detalajn detalojn en la alkroĉita dokumento.

Małgosia Komarnicka. Foto: SMG

## Ertl pri la lingvo-politiko de EU

Kiu interesiĝas pri la prelego de István Ertl: „Lingvo-politikaj evoluoj en la Eŭropa Unio“, tiu povas aŭdi ĝin. En la nomo de Hungara EDE (Eŭropa Demokratio-Esperanto) ni proponas la prelegon kun subtekstoj. En Esperanto kun Esperanta subteksto :

[https://www.youtube.com/embed/KydrK3Llq-M?&hl=eo&cc\\_lang\\_pref=eo&cc\\_load\\_policy=1&start=1](https://www.youtube.com/embed/KydrK3Llq-M?&hl=eo&cc_lang_pref=eo&cc_load_policy=1&start=1)

En la franca kun Esperantaj subtekstoj:

[https://www.youtube.com/embed/KydrK3Llq-M?&hl=fr&cc\\_lang\\_pref=fr&cc\\_load\\_policy=1&start=1](https://www.youtube.com/embed/KydrK3Llq-M?&hl=fr&cc_lang_pref=fr&cc_load_policy=1&start=1)

A ligilo estas trovebla ankaŭ en la hejmpaĝo de Hungara EDE.

([www.eszperanto.hu/EDE](http://www.eszperanto.hu/EDE))

Eŭgeno Macko



## Poznano: nova trijara kurso ekde septembro 2021 !

La Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio sub la gvidado de Prof. dr. hab. Ilona Koutny. Partoprenantoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la 1-a de aŭgusto.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=849>

Kaj bonvenon en septembro en Poznano kaj poste rete (malnovaj studentoj povas gastigi laŭ specialaj kondiĉoj)

## Poznano: la 5a Interlingvistika Simpozio – elŝuteblaj rezultoj

La 5a Interlingvistika Simpozio “Rolo de lingvoj en interkultura komunikado” okazis en septembro 2020 en virtuala formo kun pli ol 300 partoprenantoj el 51 landoj. Programo, resumoj kaj raporto: <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html>

Kelkaj prelegoj aŭskulteblas en la Youtube-kanalo de la Interlingvistikaj Studoj: [https://www.youtube.com/playlist?list=PLGDNhxSrlMB-\\_AHJnJumSq9k7Vvnf93Uf](https://www.youtube.com/playlist?list=PLGDNhxSrlMB-_AHJnJumSq9k7Vvnf93Uf)

La du volumoj el la materialoj ĵus aperis en la retejo de la eldonejo kaj elŝuteblas: <https://wydawnictworys.com/category/nowosci>

La unua lernolibro de la Interlingvistikaj Studoj, la Interlingvistiko de Vera Barandovska-Frank, elŝuteblas el la retejo de la Studoj

Lasta numero de JKI kun artikoloj ankaŭ pri Eo kaj interlingvistiko: <http://jki.amu.edu.pl> kaj <https://pressto.amu.edu.pl/index.php/jki>

Raporto pri la februara interlingvistika sesio kun instruista trejnado:

[interl.amu.edu.pl](http://interl.amu.edu.pl) kaj <https://edukado.net/novajhoj?id=809>

Prof. dr. hab. Ilona Koutny  
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj  
Universitato Adam Mickiewicz, al.  
Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan  
<http://interl.amu.edu.pl>



# Prestiĝa Eduka Konferenco serĉas prezentaĵojn

La 6a Internacia Konferenco pri Fremdlingva Instruado en Saarbrücken,  
Germanio.

Ĉeftemo:

Komunikado sen limoj - instruado, lernado kaj parolado de la lingvoj de la mondo



Temas pri la projekto de ALTE, la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo, kun kiu UEA kaj ILEI tenas rilatojn tra pluraj jaroj.

Aliĝdato por kontribuontoj, prezentantoj (kun aldonenda skizo, resumo, afiŝo por 20 min. prelego+10 min diskutado): 30 junio 2021

Respondo pri akcepto de prezentaĵoj: 31 julio 2021

Aliĝdato por partoprenantoj: 30 sept 2021. Sen kotizo.

Reta aliĝilo: <https://sites.google.com/view/6scflt-6sft-2021/registration>

Alvoko al asocioj, institucioj, ktp. por sesioj kaj kunlaboro:  
<https://sites.google.com/view/6scflt-6sft-2021/sections-talks>

Enkonduko (en angla, germana, franca):

<https://sites.google.com/view/6scflt-6sft-2021/home/english-section>

Zsófia Kóródy

Vortoj: 815

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.